

VIDPUNKTO DE HAGEGE: Claude Hagège tre lerte uzas la francan lingvon; li videble ege ŝatas kapti la atenton de la publiko per ŝercoj, vortludoj, falsaj koleroj, grandaj gestoj kaj kelkfoje vipaj rebatoj al demandoj pli malpli bone argumentitaj. Li estis tre klara en sia vidpunkto pri Esperanto: esperanto havis ŝancon en 1905, sed la espero estis nuligita pro la 2 mondmilitoj kiuj donis la venkon al la anglo-usona kiu iĝis internacia lingvo. Li diris ke, se estontece, esperanto iĝus la internacia lingvo (sed necesus miraklo) li tute ne kontraŭbatalus tion ĉar la solvo estus multe pli sekvida ol la elekto de la angla kiu estas detruanta la aliajn lingvojn. Li honeste diris ke esperantistoj ŝanĝigis lian opinion pri esperanto, ke li agnoskas la kvalitojn de la lingvo, sed ke li tute ne emas lerni artefaritan lingvon. Li preferas studi la malfacilaĵojn de la naturaj lingvoj. En dua parto, li fervore argumentis kontraŭ la uzo de la anglo-usona lingvo kiel internacia lingvo, laŭ argumentoj kiujn ĝenerale uzas ankaŭ la esperantistoj. En tria parto, li pledis por instruo plurlingva en Eŭropo. Oni frue instruu la ĉefajn lingvojn el Eŭropo kiuj jam havas internacian historion (portugalan, hispanan, francan, germanan, anglan), ne dum prilingvaj kursoj sed dum ĉiuj kursoj. La instruantoj venu de la landoj mem. Ekzemple: en Germanio, primatematikan kurson instruu Hispano, geografiaĵon instruu Franco, ktp...

VIDPUNKTO DE MOON: Moon tre trafe respondis per trankvilaj sed fortaj argumentoj en flua franca lingvo. Ni ne prezentos tiun argumentaron, ĉar ĝi estas tre bone konata en nia medio, sed ni diru ke tiaj argumentoj havis pli bonan sukceson ĉar prezentitaj de Anglo perfekte scipovanta la francan kaj lerta en lingvistiko.

DEMANDOJ DE LA PUBLIKO: Instruo de lingvoj kaj solvoj proponitaj de Hagège;-Esperanto kaj kulturo;-Lernado de Esperanto;-Malfacilaĵoj en la lernado de angla lingvo;- la regionaj lingvoj...ktp...

NIA VIDPUNKTO PRI LA DEBATO: Ĝis nun, la esperantistoj tro ofte intervenis en debato kun Hagège, kiel perditaj soldatoj, kun tempo tro mallonga por detale argumenti. Ĉi-tiun fojon, temis pri duhora debato kiu ebligis al Hagège detale paroli pri Esperanto kaj al lerta kaj klara esperantisto, Moon, rebati kiel oficiale invitita fakulo.

Ĉeestis 200 personoj, inter kiuj nur kvindek da esperantistoj. La gazeto "Ouest-France" bone raportis. La respondeculoj de la muzeo klarigis, post la aranĝo, ke malofte estis tiel sukcesa tia vespera debato, kun tiel rimarkinda kvalito de la prelegantoj.

La debato inter Hagège kaj Moon okazis en tre bona etoso, fake, ne indulge, sed kun granda respekto kaj honesto. Ili interkonsentis pri multaj aferoj; videble Hagège renkontis iun esperantiston respektindan ĉar sur la sama intelekta nivelo.

Post la debato, ni vespermanĝis en restoracio, invititaj de Memorial, kaj videble Hagège estis tre kontenta diskuti kun Moon (helpis bongustaj vinoj kaj manĝaĵoj). Li alte taksis sian kunmanĝanton kaj tiu renkonto lasos spurojn en la vidpunkto de Hagège pri Esperanto. Ni ŝuldas grandan dankon al Brian MOON.

La publiko faris multajn demandojn kaj neniam akre atakis esperanton. Ĝi plurfoje aplaŭdis (ne nur kiam Hagège ridigis ĝin, sed ankaŭ kiam la argumentoj de li kaj Moon estis rimarkindaj).

Laŭ la unuaj kontaktoj kun ne-esperantistoj ĉeestintaj la debaton, multaj havas novan vidpunkton pri Esperanto (Post la debato, ĉiuj informiloj pri Esperanto malaperis en la daŭro de kelkaj minutoj). Pluraj personoj esprimis sian deziron lerni la lingvon kaj respondeculino pri lingvistiko en universitato de Caen projektas informi siajn studentojn pri Esperanto...

La registrita debato estos je la dispono de ĉiuj ekde oktobro

Yves NICOLAS

ABONNEMENTS COTISATIONS: *A notre grand regret, nous avons dû apurer la liste de nos abonnés auxquels nous avons cessé d'adresser Normanda Bulteno. Si une croix cerclée figure à droite de cette page, cela signifie que vous aussi n'avez pas réglé votre abonnement pour 1999. Merci de bien vouloir régulariser*

RIMARKOJ DE CHRISTIAN LEVESQUE (50)

Mi ĉeestis la debaton en Memorial inter Claude Hagège kaj Brian Moon. Hagège estas spertulo pri ĉiuj lingvoj sed bedaŭrinde Esperanto ŝajnas al li tro simpla. Li ne povas kompreni ke plej multaj homoj havas malfacilaĵojn por lerni fremdan lingvon. LI ne favoras anglan lingvon kiu esprimas superregon de Usono kaj Anglio tra la mondo
Lia sugesto : translokigi lingvoprofesorojn por instrui siajn proprajn lingvojn estas bona sed utopia, bedaŭrinde

Kaj la ideo instrui 3 aŭ 4 lingvojn al la junularo (kia junularo ?) plej inteligenta estas ankaŭ utopia kaj ne justa, ĉu ne?

Brian Moon parolas malpli bone francan lingvon ol Hagège (li estas Anglo) sed li bone kaj kviete pledis favore al Esperanto menciante ties simplecon, facilecon kaj studrapidecon. Kiu lingvo por Eŭropo ? La respondo estas inter la manoj de niaj registoj

Christian LEVESQUE (50)

EŬROPA VOĈDONADO

La Eŭropa voĉdonado estis okazo kontakti politikistojn kaj respondeculojn de diversaj sociaj asocioj

La tuta franca Esperanto-movado subtenis tiun agadon kaj akiris multajn kontaktojn ĉe diversaj politikaj fortoj (Socialista, Komunista, Verdana, Radikala, RPR.)

Nun la laboro estas provi kontaktiĝi kun la ĵus elektitaj eŭro-parlamentanoj.

EN NORMANDIO:

Ni sendis dokumentaron al ĉiuj kandidatoj, partioj kaj diversaj asocioj el nia provinco. Multaj ne respondis.

En Fécamp: Mouloud kaj Taous Touileb ricevis tre pozitivan respondon de Frédérique Bredin; ŝi skribis: *"J'ai lu votre courrier du 5 avril et je me suis permis de le transmettre à François Hollande, tête de liste pour le parti socialiste pour les prochaines élections européennes, qui ne manquera pas de répondre à vos propositions."*

Pour ma part, l'idée d'une langue universelle m'apparaît comme séduisante à la seule condition qu'elle soit acceptée par tous les états et non seulement au niveau européen mais surtout au niveau de l'ONU pour avoir une réelle efficacité."

En Rouen: Pierre Quillaud ĉeestis mitingon kun partopreno de Cohn-Bendit, antaŭ pli ol mil spektantoj, li petis klarigojn pri la lingva politiko de verdanoj kaj ĉiuj aŭdis la vorton "Esperanto". Li sendis dokumentaron ellaboritan de estraro de Esperanto-Normandie al 12 partioj kaj asocioj. François Zimeray urbestro de Petit Quevilly kaj ĵus elektita eŭropa parlamentano respondis: *"Je vous remercie de m'avoir fait parvenir la documentation sur l'Esperanto. J'en ai pris connaissance avec le plus grand intérêt"*. Same agis Anne-Marie Leprévost en departemento Orne, Héruvil-grupo en Calvados kaj niaj amikoj el Manche. Mi ne scias ĉu iu agis en departemento Eure. La rezulto ne aspektas grava sed oni ne enigis najlon per unu nura frapo

REUNION DU CONSEIL D'ADMINISTRATION


D'ESPERANTO NORMANDIE:

Le Conseil d'Administration de notre association aura lieu Dimanche 24 Octobre 1999 à 10 h

à la Maison des Associations 1018 Grand Parc à Hérouville Saint Clair

Nous vous rappelons la liste des membres du Conseil élus lors de notre Assemblée Générale de Saint Lo: Yves NICOLAS Président, Pierre POTTIER Vice-Président, Sylvie CARON Secrétaire Pierre QUILLAUD Trésorier et Bulletin, André MORIO Bulletin, Christian LEVESQUE Relations Extérieures, Sébastien ERHARD et Yves BACHIMONT pour la section "jeunes", Pierre JOUVIN controleur, Sylvie BONNET (27), Jean GIBAUUX (Le Havre), Marco TEANI (Canteleu), Mouloud TOULEB (Fécamp), A.M. LEPREVOST (Orne)

PRÉSENCE INDISPENSABLE



ESPERANTO-JEUNES

Pendant de nombreuses années, nous nous sommes plaints que les jeunes ne s'intéressaient pas à l'Esperanto. Il n'en est plus de même et l'on peut dire que les jeunes ont redynamisé Esperanto-France. Sous leur impulsion, de nouvelles initiatives ont été prises. Cela saute aux yeux lorsque l'on voit le matériel de propagande mis à notre disposition: tracts, affiches, revues, disques etc...

Les jeunes sont regroupés internationalement dans TEJO et à l'échelon français dans JEFO.

Dans le Conseil d'Administration d'Esperanto-Normandie figurent 2 jeunes: Sébastien ERHARD pour la Normandie nord et Yves Bachimont pour la Normandie sud. Ils viennent de participer au congrès mondial de la jeunesse espérantiste en Hongrie. Vous trouverez leur adresse dans l'article ci-dessous.

Les jeunes de TEJO organisent des fêtes ayant un thème gastronomique et l'an prochain, ce sont nos jeunes normands qui devront organiser une rencontre dans notre province; ils ont choisi comme thème: "La Pomme"

Ils demandent votre aide pour organiser ce rassemblement et aussi pour créer des groupes de jeunes dans notre région.

POMA SEMAJNFINO

La gejunuloj de Normandio tra JEFO organizos en Septembro 2000 (precize de la 22a ĝis la 24a) gastronomian semajnfinoon rilate al poma kiel ĉefa temo. Ĝi estos la Poma Semajnfino. Ĉiuj homoj - kaj ne nur gejunuloj - estos kompreneble bonkore akceptataj por ĉeesti tiun distran renkontiĝon, dum kiu oni ne nur kuirados, sed ankaŭ povos babili, muzikumi, promeni ktp...

Pri tio, ni invitas ĉiujn normandajn esperantistojn kunlabori en tiu aranĝo. Kelkaj jam pretas verki aŭ kolekti receptojn enhavantajn pomojn. Aliaj havas ideojn por vigligi la vesperojn aŭ vizitigi la regionon. Verŝajne la renkontiĝo okazos en "Pays d'Auge" sed ĉies proponoj kaj helpoj estos bonvenaj por la organizado.

Se vi interesiĝas pri tio, bonvolu kontakti:

- por Suda Normandio: Yves BACHIMONT 106 rue d'Orléans 14000 CAEN
Tél. 02 31 75 15 74 Retadreso: YBachimont@esperanto.org

- por Norda Normandio: Sébastien ERHARD 13 ter rue Raymond Botté 76380 Canteleu
Tél. 02 35 36 18 36 Retadreso: hodos@europost.org

LIBRO TRADUKITA DE NORMANDA ESPERANTISTO :

Ĝus aperis libro kiun tradukis normanda esperantisto: -Libere de la konoj. - La unika filozofio de J.Krishnamurti (1895-1986). Unuafoje en Esperanto, tradukita de Yves Bachimont kaj mendebla ĉe la tradukinto kontraŭ 59 FRF (sendkostoj inkluzivitaj) Vidu adreson ĉi-supre

J.Krishnamurti estas unu el la plej famaj spiritalaj instruistoj de nia jarcento. Lia celo ne estis krei novajn katenojn pere de ideologio aŭ sekvenda religio, sed "igi la homojn plene kaj komplete liberaj". Unika filozofo kaj unika filozofio - pensiga, veka, liberiga. Ĉio ĉi en facile komprenebla Esperanto

ASSOCIATION "REINSERTION & ESPERANTO" à but non lucratif selon la loi de 1901

CCP N° 621227 T Montpellier; Siège social Résidence Vigne de la Vierge 147 Av. P.Bringuiér

34080 Montpellier Tél. 04 67 75 62 98 continue son action de réinsertion des jeunes au moyen de l'Espéranto, des conférences grand public, des présentations de l'espéranto en milieu scolaire (à 900 élèves depuis 1998) et orientera cette année son effort sur les instituteurs afin de les informer de la valeur propédeutique de l'Espéranto.

Continuez à aider cette association. Les donateurs peuvent déduire 50% de leurs dons. Une attestation fiscale vous sera adressée en retour

Kio okazis en la Departemento 50

Ni salutas vin unue, kaj bondeziras al vi utilan laboron dum la tuta jaro. Meze de Junio, finiĝis la kursoj, al kiuj akurate deestis 6 aŭdantojn. La lasta kutima kunveno okazis fine de la monato. Bedaŭrinde, la komencantoj deestis nek la SAT kongresojn, (Francio, Ĉekio) nek al U.Kongreson en Berlino. Tamen kelkiuj el ni aliĝis kaj partoprenis staĝojn, en Plouezec (22), en Bouresse (86). De nove, mi estis insiste petita de personoj el Ĉerburgo, por ilin informi kaj preparoli Esperanton. Mi jese respondis kaj inform-kunveno okazos meze de septembro. Verŝajne tri je kvar personoj aliĝos al ia perkoresponda kurso, pro la malebleco, kiun mi havas instrui la urbo mem. Male, ĉar la feritempoj nun finiĝis, en St Lo Esperanto 50 daŭrigos la unuagradan kurson, kiun mi komencis pasintan jaron. Ĝi komenciĝos finseptembre kaj celos la praktikon de la lingvo. Mi esperas varbi novajn anojn per la gazetara informo kaj la "busalorelo" de niaj aktualaj gelernantoj

Ĝis revido

Andreo

Nu, ni parolu pri Esperanto

Ĝi ne estas slangaĉo per kiu oni paroladas pri io ajn, aŭ nur lingvaĵo por malfruintaj samideanoj sed vivanta lingvo je dispono de la homaro. Iam, mi pridiskutis tion kune mia bofilo, kiu diris al mi:

- "Pacjo ... ĉu vi kredu la disdonon pri tiu temo, inter la grandaj potencoj, kompreneble sen eĉ priatenti la malgrandajn, jam ŝanĝis aŭ ŝanĝos ion".

- Ve, ne. I mi timegas, sed tuj kiam la lingvo penetros lernejon - tio estas la celo de nia movado kaj mi ekkredas en ĝi - mi pripensemos sukceson de tiu entrepreno.

- Mi bone komprenas, sed laŭ vi, ĉu Esperanto estas lernenda frue malfrue?

- Jes, ĉar komuna lingvo nepre devas partopreni al komuna mondo, kiel sableroj faras strandoj kaj Euro faras monon

- tio estas, ne la afero de estrarestro, kaj la "popoleta" ne rajtas preparoli fiaferojn.

- La politikoj ne prizorgas tiun kulturen problemon, malgraŭ estraro de geministroj. Ili ankoraŭ ne agnoskas same kiel siaj politikaj (pra)uloj de la 20aj jaroj. Eble tion mi ne vidos, ankaŭ vi, sed verŝajne viaj idoj utiligos helpan lingvon, ĉu Esperanto? Povas esti kaj dezirinda

- Ni do, supozu, lernejo instruas Esperanton, kiel propagadi la lingvon?

- Se eblas eklerni Esperanton lerneje, signifus agnoskon kaj povus okazi oficialaj ekzamenoj kies sukceso certe pligrandigos kaj kuraĝigos la lernantojn - plie vi sciu jam Esperanto instruigas oficiale en pluraj orienteŭropaj landoj kaj utilas kiel instruilon de lingvolernado jam uzita eksterlande.

- Mia patrino, kiu instruas anglan lingvon opinias alimaniere pri tio.....

- ŝi rajtas sed ne pravas tion diri, verŝajne nescias kiom interesinda la lingvo estas. Samtempe ĝi povus esti la standardingo de la komunikado.

- Do, kaj pri la dulingvismo kion vi opinias? Kelkaj lingvistoj estas, se ne tre malamika, almenaŭ deteniĝemaj.

- Estas vere, ili parolas kiel ĉiujn eminentajn personojn, ofte poliglotoj kaj oni diris tiom da malveroj,

- Panjo, tiel estas ... eble tial ke ŝi ne konas!

- Vi sciu por instrui alian lingvon, la tempo okoblas kaj nur dekono de la lernantoj sukcesas la ekzamenojn.

- Kompreneble, ili estas tro multnombraj en ĉiu klaso.

- jes, kvin/sesope sufiĉos Sed, pri la onidiroj, same kiel pri la personoj estas ĉiam tre malfacile, korekti malbonan famon, eĉ kiam ĝi estas falsa. La malagrablajoj trafas pli rapide ol veroj.

- Oni diras ke Esperantio estas lulilo de senpatrujaj uloj

- La kritikantoj, kiuj nenion scias ĉiam vipurumas. Volenevole Esperanto sukcesos. Jen!

Vi rajtas pensi: kial do, tiu teksto por tion diri?..... Jes, kial ..! Legu Se vi ne trovas, mi klarigos

"ESPERANTO 50" - 631 rue de Carentan - 50000 - Saint lo. ————— Kutimaj kunvenoj okazos ĉe
Centre Culturel - Place du Champ de Mars - Saint Lo ĉiun lastan sabaton vespere je 17.30 ĝis la 20.00h

Ĉu vi pensu, Ni, francoj rajtas diri, ke la usonangla lingvo kiu invadas la tutan Eŭropon? ĉu ne, ankaŭ ni, kiu tiel agadis Afrikon? La bona lingvo devas esti sen Patrujo nek angla nek franca !

Pro tio, mi tradukis

Andreo

“HARO” kontraŭ la franclingva regado

Kelkiuj pretendas, ke la arablingvo estas farita ne por la afermondo. La dirantoj de tiu “FATWA” estas multnombraj, kaj ĉe sia kapo, plenmano da marokaj aferuloj kaj respondeculoj de gravaj firmaoj. Kiam oni sin demandas, kial nia lingvo ne taŭgas aferojn., mi persone estas surprizegita. Al tiuj anoj mankas



solidaj argumentoj, kiam ili frontas al sukceso de Egiptio, Sirio, kaj landoj de la Golfo, kiuj imponas araban kvazaŭ oficiala lingvo en ĉiuj aranĝoj. Tiu fakt-stato kreas

handikapon por nacia ekonomio.

Realece, ĝi estas reflektado de necerteco, kiun nutras tiuj respondeculoj, vidalvide de la franca lingvo, pro sia afektita formado. La malfeliĉo de maroka ekonomio estas fakte, ke ĝia destino staras en la manoj de tiuj ĉi personoj. Tiu elito nescias kaj estas surda pri ĉiujn alvokojn al rekonsiderado de maroka identiteco kaj ĉiujn mediajn propagandojn. Eĉ la iniciato de la Unua Ministro Abderhamane Youssoufi pri tio ne havis antaŭviditan efekton. Kial la marokaj respondeculoj kuraĝegas prezenti al siaj arabaj samuloj, la avantaĝoj per la Moliera Lingvo. Tio estas la realeco kiun ni vivas, ĉiumomente.

Ekzemplo la plej vidinda estis intervjuo donita de la profesigrupa prezidanto de la marokaj bankoj, al ĵurnalisto de la araba kanalo “Al Jazira”.



La respondoj estis ĉiuj formulitaj franclingve, kvazaŭ li alparoladis francan kaj svisan publikon, tiam ke 90% da televidantoj ne estus komprenonta, se ne estus havontaj tradukon pri tio. La arabaj televidantoj certe ne komprenis. Ili ne kutimas vidi siajn respondeculojn paroli france aŭ angle, kiam ili alparolas arabojn. La uzo de unu aŭ pluraj lingvoj estas ne diskutebla. La komunikado, en ĉiuj fakoj estas esenca, kondice ke tio ne fariĝu kontraŭe la lingvo kaj la nacia identeco.

Plimulttempe, la arabaj vizitantoj iĝas dubindaj fronte al tiu fenomeno. Eĉ la eksterlandanoj, precipe francoj, ne kaŝas sian miron, vidi tion daŭrigi kvardek tri jarojn post la sendependeco de la reĝujo. La solvo tiu problemon estas en la manoj de la ekonomiaj rolantoj. Pri la registaro, ĝi ŝajnas preterlasita de la eventoj. De tiom plu, ke : nombro da ministroj parolas nur franclingve en oficialaj okazaĵoj.

Samir Chawki

Al Sahifa - Casablanca

Legita en “courrier International” n° 452 du 01 / 07 / 99 -

	I	II	III	IV	V	VI	VII	VIII
1	G	E	N	E	R	A	L	E
2	E	H		D	I	R	I	S
3	N	E	N	I	O	M		E
4	T		E	T		I	S	O
5	I	N	K	O		K	U	N
6	L	A		P		O	O	
7	A	N	Ĉ	O	J		H	E
8	J	A		J	A	K	O	J

Definitions françaises — trouvez les mots en Esperanto

Vertical

I - Polis . II - Ci joint - très petit . III - pas toi, pas moi . IV - ils impriment et vendent des livres. V - ville brésilienne. - certes. VI - contre les chocs. VII - ni toi, ni moi. - c' est plus grand qu' un tiers, VIII - nouvelle litt.(ac) - suffixe de lieu (rad)

Horizontal

1 - presque toujours. 2 - dedans. - disait. 3 - c' est moins, que peu. 4 - diminutif (rac) - le descendant. 5 - pour écrire . l' un avec l' autre. 6 - Défini. Lac pyrénéen. 7 - embouchures.- negation. 8 - certes.- vestes

DUM UNU SEMAJNO EN RUSIO

Inter la 3a kaj la 10a de Julio, kun tri geamikoj de nia esperanto-klubo de Hérouville (Evelyne Boinet, Patrick Etienne, Yves Nicolas), mi restadis en Rusio.

Ni fakte respondis al invito de rusaj samideanoj kiuj, dum Aŭgusto 98, haltis en Normandio post la kongreso en Montpellier.

Nia restado en Rusio konsistis el 2 partoj. Unue, turismo kaj vizito de Sankta Peterburgo kun afablaj ĉiĉeronoj kiuj montris al ni tiujn mirindaĵojn de la "Norda Venecio". Ili parolis ĉu francan, ĉu esperantan lingvojn, eksplikis rusan ĉiutagan vivon, aŭ klarigis historiajn punktojn. Ni tranoktis en modesta hotelo kaj manĝis en restoracio. Foje, ni aŭskultis popolan muzikon kaj kune kantis rekantaĵojn (refreĵojn).

Due ni translokiĝis al Tihvin, urbo je pli ol 200 kilometroj de St-Peterburgo, kaj jam de pluraj urboj ĝemela urbo de Hérouville. Tie okazis la 39a Okcidenta Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (Oksejt). Temas pri ĉiujara tutrusia kunveno (lastjare en Ceboksary (Ĉuvaĉio) kaj venontjare en Moskvo) Pli ol 250 personoj partoprenis diversajn programerojn: lingvokursojn, movadan historion, teatroarton, klubojn laŭ ŝato...

Homoj venis de plej diversaj partoj de Rusio, eĉ de aliaj respublikoj kaj landoj (Dagestano, Ukrainio, Nederlando, Finnlando...) La mez-aĝo estis 31 jaroj kiu bone aŭguras por la movado. Ni multe interŝanĝis, babilis por finfine konstati kiel proksimaj estas niaj celoj. Ni diskutis pri uzado de Esperanto kiel ilo kontraŭ la danĝeroj de la angla lingvo kiu pli kaj pli invadas nin. Ni ankaŭ parolis pri internaj problemoj en la esperanto movado: tro malmulte da scipovantoj kaj aktivuloj.

Kun granda plezuro, ni do renkontis novajn amikojn sed ankaŭ retrovis amikajn konatulojn el Tihvin mem. Gastigemaj, ili invitis nin en siajn hejmojn. Tiel ni povis konstati kiel reale vivas homoj provantaj elturniĝi en tiu malfacila periodo por tiu lando. Ni naĝis en lago, ni ŝvitis en saŭno, ktp...

Por mi tiu vojaĝo estis tre interesa. Mi esperas ke baldaŭ aliaj okazos. Esperantujo estas vasta kaj varmkora. Ĝi ekzistas ne nur ideale sed ankaŭ tre konkrete por tiu kiu tion deziras. Kiu volas pli, povas pli, ĉu ne?

Claude FERRAND
grupo de Hérouville)

MORTIS BARBARA

Barbara Petrovna Cvetkova forlasis nin por eterne la 13an de Aŭgusto 99. Preskaŭ ĉiuj esperantistoj kiuj travizitis St Peterburgon estis gvidataj de ŝi kaj de ŝia filino Valerija.

Mi konatiĝis kun ŝi en 1960 okaze de vojaĝo organizita de Junulgasteja asocio. Ni daŭre korespondis kaj iam, komence de la jaro 1990, ŝi skribis al mi : "Dank'al nia Prezidanto Gorbaĉov, ni rajtas nun vojaĝi eksterlanden kaj mi tre deziras viziti Francion."

Mi ne hezitis kaj tuj klopodis por oficialigi invitleteron kiun ŝi nepre bezonis por akiri enirvizon en Francion. Komence de junio, ŝi alvenis Parizon per trajne. Tiam, ŝi estis 80-jara. Ŝi vizitis multajn esperantistojn en Normandio kaj ili sendube memoras pri tiu kuraĝa maljunulino kiu rakontis la terurajn tagojn dum malsato en Ukrainio kaj dum sieĝo de Leningrad. Post Normandio, ŝi faris rondvojaĝon ĉirkaŭ Francio dank'al solidareco kaj amikeco de samideanoj kiuj deziris inviti ŝin. Tiu vojaĝo estis unu el la plej feliĉaj momentoj de ŝia vivo.

Ŝi mortis preskaŭ 90-jara. Nelli Kublanova (alia Peterburganino bone konata de Normandoj) skribas : *"Ŝi restis en E-vicoj, aktiva, bonkora, ĉiam preta helpi, kompatema dum 71 jaroj... Multaj el ni havas signojn de ŝia atento, diversgrandajn, diverstemajn pentraĵojn; ja ŝi estis profesia pentristino. Pli ol 75 esperantistoj kaj geamikoj venis al krematorio por esprimi sian bonkorecon al ŝi. Poste, samtage, 60 personoj kunvenis en nia klubejo por rememori ŝin."*

Pere de interreto, kaj nome de normandaj esperantistoj, ni kondolencis ĉiujn peterburgajn samideanojn kaj precipe Valerija, ŝia filino, aktiva kaj sindona esperantistino.

Petro KIJO

Berlino – 84a Universala Kongreso de Esperanto

Inter la 31a de Julio kaj la 7a de Aŭgusto okazis la 84a Universala Kongreso en Berlino kies la temo estis : « Tutmondiĝo – ŝancoj por paco ? ». Kongreso estas ankaŭ la plej grava momento de la esperantista jaro por kiu komencas la lernadon de la lingvo ĉar estas la okazo apliki ĝin. Kongreso : oni preparas ĝin plurajn monatojn antaŭen ĉar oni devas enskribiĝi (frue por profiti interesajn prezojn), ĉambron rezervigi, planigi vizitojn, pripensi la monon, k.t.p.

Du gelernantoj de la grupo de Grand-Quevilly partoprenis. La kongresejo estis tute proksime kiam ni alvenis surloke per buso. La akcepto, la formalizaĵoj kaj la remeto de sakon kun dokumentoj (utilaj informoj pri kongreso aŭ Berlino) : ni jam baniĝis en la afero ! Ni vidis kelkajn konatajn personojn : la kontakto estas facila. Eble oni serĉas sia(j)n korespondant(in)o(j)n.

La kongresa libro klarigas pri la lokoj kaj la programoj. Legante la laŭtaga programo, oni konstatis ke pluraj aktivecoj estis proponitaj samtempe. Oni devis elekti /planigi. Ankaŭ, pri la diverseco de proponoj (muzikoj, konferencoj, tekniko, religioj, ŝatokupoj, diversaj temoj) oni konstatis la efikecon de la lingvo (ilo).

Sabate, la unua tago finiĝis per interkona vespero.

Dimanĉe matene okazis la solena inaŭguro en la granda salono Zamenhof (5.000 sidlokoj). Momento ĉiam impresa : paroladoj, prezentado de diversaj landoj kaj landanoj, k.t.p.

Ekde la 9a ĝis la 17a, la tagoj estis plenplenaj. La vesperoj estis okupitaj pri : nacia vespero, bankedo kaj balo, teatro kaj internaciaj artoj.

Merkrede okazis ekskursita tago (aŭ libertempo por kiu elektis nenion oŭ malfrue).

Oni povis viziti, tuttagajn ekskursojn : Potsdam, la « versajlo » de Berlino ; Dreseno, urbo de arto ; boatado tra Spreewald ; vojaĝo tra diversaj religiaj komunumoj ; memore pri la viktimoj de naziismo ; Lepsiko – klasika muziko kaj literaturo... Duontagaj ekskursoj : Berlino vizio 2000, Berlino nokte, muzea insulo, enkonduko al la urbo Berlino...

Sole aŭ ope, oni povis viziti la urbon : Bundestaga kupolo, grandaj placoj kun homamaso, arto en la urbego per diversaj statuoj, monumentoj, muzeoj..., zoologia parko, Checkpoint Charlie, Brandenburga Pordego, kolono de la Venko. La diverseco kaj la efikeco de transportrimedoj. La verdaĵo : 25 procento de la urba surfaco estas okupitaj de akvo kaj arboj. La pontoj, pli nombraj ol Venecio, oni diras. Vastegaj konstruejoj kaj renoviĝoj ; se oni rigardas ĉe la horizonto, oni vidas gruojn, gruojn, gruojn ; la urbo ŝanĝiĝas de tago al tago.

Sabate okazis la solena fermo kun belega spektaklo varmege aplaŭdita. Oni anoncis la landon kie estos la U.K. 2002 : en Brazilo ; se mi bone memoras, ni estis 2.709 partoprenintoj el 65 landoj.

Por kiu volas/povas, okazis la post kongreso « de Bukaresto al Budapeŝto »... por spekti la kompletan suneklipson la 11an de Aŭgusto ; aŭ alia ebleco : naturekskurso ĝis la Balta Maro.

Mi memoras agrablan vesperon kiam ni diskutis inter Cubanoj, Poloj kaj Francoj... ; ankaŭ, ekspozicion de grandega bildkarto de la organizintoj de la lasta kongreso en Montpeliero (pluraj kvadrata metroj) : ĉiuj kiuj volis skribi kaj subskribi povis fari tion.

Mi revenis pli riĉa de memoraĵoj, renkontiĝoj, kaj pli bonigis mian ligvon.

Dominique, (Bihorel)

Grupo de Grand-Quevilly

"LE FAR BRETON" RECEPTO DE BRETONA KUKO

Kiam oni ĝin gustumis, oni reprenas da ĝi

Lastan jaron, ni havis la recepton por prepari kukon taŭgan por 70 personoj. Tiu-ci jare, - ankaŭ pli forte- jen indikoj por 90 personoj (eĉ pli). La preparo estas longa (pluraj monatoj), delikata, sed kiam oni elektis la ĝustajn, la specialajn elementojn, la rezulto estas certa. Pacienco kaj kutimo kontribuas egale.

Favora periodo: inter la 20a kaj la 27a de Aŭgusto.

Prenu sufiĉe grandan ujon. Kvar kuirstinoj sindonemaj, spertaj kaj lertaj ĉar la kuirado daŭras dum unu semajno sub la kontrolo de Roger; ankaŭ estas necesa dommastrino kiu movas, korektas, almetas, mildigas: estis Louise. Se estas tri fratinoj kaj dinamika teamo, estas pli bone kaj perfekte. Ne forgesu 3 ĉefajn elementojn, eĉ 4, eĉ pli, venante de diversaj landoj: Ukrainio (Dmitri), Nederlando kaj Argentino (Atilio), Italio (Mario), Francio (Jean-Pierre kaj ankaŭ Manjo)

Kantante, oni laboras pli bone: ne forgesu la diapazonon de Françoise por kirli la saŭcon. Oni miksas kun kelkaj elementoj (ul(-in)o)j de la pasinta jaro. La temperaturo ne devas esti tro varma sed tamen sufiĉa. Ne malvarmigi!

Ne estu ripozperiodo sed ĝi simulu pli al abelejo ol al...muelejo !

Tute hazarde, ne aŭskultante, ni aŭdis la kuirstojn flustri: "Jam, oni devas pripensi la sekvantan kukon !"

Finfine, senorde, mi notis: vizitado de abatejo Beaufort, klifoj kaj parkoj de ostroj, mistera templo de Lanleff, Kermaria en Isquit (Plouha) : "unu mortinto, unu episkopo, unu mortinto, unu nobelo...unu nova sonorilo...", koncerto en la preĝejo, vespera aranĝo "Diwan" ("la semo" en bretona lingvo) pri bretona kaj esperanta lingvoj, la jaro "Louis Guillou", verkisto el Saint Briec kies libro "La maison du peuple" estis tradukita de Manjo (ĉi tradukis ankaŭ plurajn aliajn tekstojn); Bretoniaj dancoj kaj fotekspozicio pri "Terre d'espoir d'Armor"; teatraĵo, kantoj, rakontoj; oficiala fermo de la aranĝo kun ĉeesto de oficialaj ĵurnalistoj kaj parolado de la prezidanto de regiona konsilantaro; kantado de bretona himno; Loguivy de la mer: "ci rigardas morti cialn lastajn verajn maristojn"; post la fino de la staĝo, vespere, la spektaklo en la kafejo kun Kanadaj muzikistoj.

Ili diris : "Kenavo ar...chal !" Mi diris : "Ĝis"

La Reĝo

Il est nécessaire de préciser qu'il s'agit de la 3ème rencontre internationale organisée à Plouezec dans les Côtes d'Armor du 20 au 27 Aout. 75 adultes et 15 jeunes y ont participé. Il y avait des cours de 4 niveaux. Les choristes ont chanté dans l'église devant 200 spectateurs. C'est la 2ème fois que notre ami Dominique LEROY (La reĝo) y participe. C'est donc bien. Alors, l'année prochaine, d'autres normands auront peut-être envie d'y aller

72-a KONGRESO de S.A.T. en Karlovy Vary (Karlsbad) Eltiraĵo el "SENNACIULO":

Atendis nin riĉa, varia programo: krom la nepraj laborkunsidoj, kunvenoj de la LEA-oj kaj frakcioj, okazis prelegoj pri la kuracpovo de la akvo en Karlovy Vary, pri la traktado de mense handikapitaj homoj, pri la okcitana lingvo, pri la sendokumentuloj en Francio, pri ekonomikaj kaj socipolitikaj problemoj, pri Jeroŝenko, pri filatelo, pri pensiga sorto de murdinto en Aŭstralio kaj interdiskuto kun Ĉeĥa sindikatisto. Ĉiu temo instigis la aŭskultantojn fari multe da demandoj. Pro manko da tempo, la prelegantoj ne sukcesis respondi al ĉiuj.

Iom da turismado sub bela suno, ĉu buse, ĉu piede, renovigis la fortojn de la ĉeestantaro. Operkantistoj regalis la muzikemulojn kaj folkloro grupo la dancemulojn.

Unuvorte, la kongreso estis bonege organizita, vigla kaj gaja.... Ĉu tio signifas ke SAT nun pli bone fartas ? Ni esperu ke la kongreso en kuraĉloko tiel efikos

Franciska Toubale

La 73-a SAT-Kongreso okazos en Moskvo dim somero 2000

AGO-TAGO:

les premiers jours d'octobre dans le monde, on fait au moins une Journée-Esperanto. Que chaque groupe et aussi des isolés fassent quelque chose: participation à des forums d'associations, articles dans la presse, débats atc...

TRAVAUX PUBLICS ET GÉNIE CIVIL

Comment traduire en esperanto: "travaux publics" ? Cela semble simple, nous disons "publikaj laboroj" (anglais "public works", espagnol "obras públicas"). La question mérite pourtant examen.

Si une entreprise fait construire pour son compte sur son terrain privé, des routes, des bâtiments, des réseaux divers, elle fait appel à une entreprise de travaux ... publics. L'appellation est erronée puisqu'il s'agit de travaux non pas publics pour la collectivité, mais de travaux privés. On contourne parfois la difficulté en parlant de travaux de "génie civil", ce qui n'est pas plus clair. En effet, les travaux de construction d'une caserne ou de la ligne Maginot, exécutés pour l'armée et souvent par elle même (par le Génie!) comportent une importante partie de "génie civil" ! On est en pleine confusion, même si l'on fait appel aux "Ponts et Chaussées" qui s'occupent aussi de ports, phares, permis de construire, plans d'occupation des sols, protection des rivages etc, etc ...

Que les langues traditionnelles se contentent de ces approximations, soit! Mais l'esperanto doit-il leur emboîter le pas ? Mon collègue Auguste BROISE, délégué de l'UEA, auteur du "Fakterminaro pri pontoj kaj ŝoseoj" publié dans la deuxième partie du jarlibro 1959, avait créé le néologisme "VIRKO" pour traduire le français "ouvrage d'art" (grava, daŭra rezulto de materia konstrua laboro), et ainsi remplacer le lourd et trop vaste "laboritaĵo". Virko correspondait dans le domaine de la construction à ce que "VERKO" exprimait dans le domaine intellectuel. Le PIV de M. Waringhien n'a pas entériné cette racine, mais le "Terminologia Centro" de la Internacia Scienca Asocio Esperantista de UEA (ISAE) en Ontario Kanado, tiam gvidita de S-ro Rüdiger Eichholz, l'a fait. Lorsque j'ai eu moi même à écrire en esperanto sur des sujets de ma profession, j'ai senti que cette excellente trouvaille lexicale de A. BROISE devait voir élargir son sens. VIRKI devait signifier à mon avis:

"Mener l'ensemble des travaux nécessaires pour réaliser des ouvrages tels que le gros oeuvres des bâtiments, routes, ponts, ports, canaux, barrages, aérodromes, etc. Cela englobe essentiellement les terrassements, les travaux à base de béton de ciment ou de liants noirs". Je rencontrai mon ancien chez lui à Nonnancourt (Eure) concernant cette extension du sens de son enfant, et il fut d'accord. Le T.C de ISAE également (lettre du 26.12.1977).

Il était dès lors possible avec l'arsenal d'uffixes dont dispose l'esperanto, de faire donner toutes ses possibilités à cette racine; on pouvait notamment former:

1 - Ouvrage d'art:	Virkajo
2 - Les travaux publics:	Virkado
3 - Chantier de travaux publics:	Virkejo
4 - Chef de chantier	Virkejestro
5 - Bureau de chantier	Virkejoficejo
6 - Engin de travaux publics:	Virkatoro
7 - Entreprise de TP:	Virkentrepreno
8 - Ingénieur de TP:	Virkingeniero Virkingeniero
9 - Ouvrier (ou agent) de travaux publics	Virkisto
10 - Gros oeuvre:	Dikvirkado (ou "pezvirkado")
11 - Le Service des Travaux Publics	La Publika Virkofico
12 - Un employé des Travaux Publics	Publika virkisto (ou "publika virkoficisto")
13 - Des travaux publics "privés" (!)	Privata virkado
14 - Des TP pour ou par l'Armée	Militista virkado (ou "defenda" -)
15 - Le Génie militaire	Armea virkokorpuso (qu'a-t-il de "pionnier" en effet?!)

Toutes ces notions me semblent difficiles à rendre autrement en esperanto. Il serait intéressant de voir comment d'autres langues, notamment asiatiques, résolvent le problème. (l'arabe dit "achral al 'omumiya", reprenant les errements franco-hispano-anglais)

Henri ROUSSEAU
Ingénieur (en retraite) des Travaux Publics de l'État
(Emerita virkingeniero de la (franca) Ŝtato)